Trale gente la jarkolektojn nun, post 40 jaroj, kritika observanto miras pri la bona kvalito kaj bela aspekto de la du gazetoj. Ambaŭ estis bonaj, kvankam ili estis tute malsamaj. AE estis la organo de unu viro, S-ro Baker, kiu skribis en Februaro 1907: "Mi nun laboras 14 horojn ĉiutage". Li estis estinta prelegisto en amaskunvenoj tiutempe nomitaj "Lyceum". Lia stilo respegulis la flaman oratoradon de la prelegtribuno kaj samtempe la atakemon de la pionira ĵurnalismo de okcidenta Usono. La argumentoj estis frapaj, kvankam ne ĉiam logikaj; la faktoj estis prezentataj en vigla, interesa, kolorplena maniero, kvankam ofte kun troigo kaj trosimpligo. Legante liajn artikolojn, oni havas la impreson, ke oni aŭskultas sinceran kaj ŝatindan personon, kiu batalas por granda afero kaj kies entuziasmo estas preskaŭ nerezistebla. Lia ĉefa intereso estis, ne servi la Esperantistojn, sed varbi novajn anojn por la movado. Tial li ĉiam denove reprenis gramatikon kaj vortareton, ĉiam ripetis la samajn argumentojn. Preso, papero kaj tipografia aranĝo estis bonegaj. La kovrilo eĉ nun estus konsiderata moderna kaj bongusta (kvankam laŭ mia opinio ĝi ne estis tiel bela kaj okulfrapa kiel la nuna). La gazeto aperis ĉiunmonate (aŭ preskaŭ) kun 16, 24, 32 kaj kelkfoje eĉ 64 paĝoj. Oni do preskaŭ povus envii la "malnovan" AE de antaŭ 40 jaroj. (Kompreneble, sekvante la modernan evoluon en ĵurnalismo, la nuna AE prezentas sian enhavon en multe pli konciza kaj "densa" formo.)

Kiel decis por gazeto aperanta en Boston, "Amerika Esperanto-Ĵurnalo" havis pli altan nivelon ol AE, uzis trankvilan, respektindan stilon, publikigis pli grandan kvanton da novaĵoj kaj havis sufiĉe grandan kunlaborantaron. Ĝi enhavis pli multe da materialo en Esperanto, malpli en

AMERIKA ESPERANTISTO

angla lingvo. Papero, preso kaj aranĝo estis malpli bonaj ol tiuj de AE, kaj ĝi tute ne havis la ĉarmon de tiu senkompare vigla stilo kaj de tiu rekta alvoko al la leganto, kiuj estis la forto de AE.

AEĴ publikigis detalajn raportojn pri la diversaj Esperanto-kluboĵ, kiuj estis multnombraj kaj agemaj. Komence de 1908 ĝi enhavis interesajn priskribojn pri la agado de Edmond Privat en Usono kaj Kanado. S-ro Privat, juna svizo (nun Profesoro en la Universitato de Neuchâtel) venis al Usono por propagandi Esperanton kaj instrui la lingvon laŭ propra "paroliga" metodo. AEĴ raportis, ke S-ro Privat eĉ klopodis varbi Prezidanton Theodore Roosevelt por Esperanto. AEĴ ankaŭ enhavis interesan raporton pri per-Esperanta vojaĝo tra Rusujo kiun faris en 1907 S-ro Edward K. Harvey, Sekretario de la Bostona Esperanto-Societo.

Inter la materialo, kiun AE publikigis antaŭ 40 jaroj, estis rimarkinda traduko de la Konstitucio de Usono, farita de S-ro George Winthrop Lee.

En 1911 S-ro Baker, ĝis tiam sola posedanto de AE, vendis la gazeton al grupo da Esperantistoj, kaj D-rino Ivy Kellerman Reed fariĝis ĉefredaktorino. Artikoloj verkitaj en bonstila, klasika Esperanto, serioza prezentado de faktoj kaj argumentoj, kunlaborado de multaj el la plej famaj Esperantistoj el ĉiuj landoj gajnis al AE en tiu epoko tre altan reputacion en la tutmonda Esperantista gazetaro. Post tiu epoko AE vojaĝis al diversaj urboj, preskaŭ ĉiam sekvante la Centran Oficejon de EANA (Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko). Ĝi havis brilajn sukcesojn kaj suferis malsukcesojn kaj sortobatojn. Ĝi kaŭzis multe da kapdoloroj al sinsekvaj redaktoroj, kies klopodoj ofte estis vanaj, ĉar multaj Esperantistoj ne komprenis la gravecon de bona gazeto kaj preferis fondi privatajn gazetojn, gazetetojn kaj gazetaĉojn aŭ bojkotis la ĵurnalon, ĉar ĝi ne ĉiam kontentigis iliajn personajn dezirojn kaj ne suface flatis ilian vantecon kaj ambicion.

En 1933-34 AE preskaŭ mortis, dronante en ŝuldoj kaj

AMERIKA ESPERANTISTO

konfuzo. Tiam S-ro Joseph Leahy, kvankam jam maljuna, savis la ĵurnalon kaj savis EANA. En formo modesta kaj multobligita (laŭ la ofset-metodo) li tenis la gazeton "super la akvo" dum preskaŭ dek jaroj. En 1943 S-ino Mabelle L. Davis redonis al ni gazeton bele presitan. En 1944 la gazeto venis al New York, "ĉefurbo de presado kaj publikigado en la mondo".

Se ĉiuj eksredaktoroj de AE verkus siajn "rememorojn", la volumo farus interesan legaĵon. Ĝi estus plena de entuziasmigaj kaj kortuŝaj faktoj pri fideleco kaj oferemo sed ankaŭ de penigaj ekzemploj de blindeco kaj malkompreno.

Tamen, "cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante". Starante sur la ŝultroj de siaj antaŭuloj, la nuna redaktoro de AE kaj liaj gekunlaborantoj daŭrigas la laboron komencitan antaŭ 41 jaroj kaj adaptas ĝin al la bezonoj de nova epoko. AE devas esti inda de sia pasinteco kaj inda de sia tasko: disvastigi la scion kaj uzon de Esperanto en Nord-Ameriko. Kun justa fiereco Ivy Kellerman Reed, diris en Marto 1911: "Kelkaj el la plej eminentaj eŭropaj Esperantistoj skribis, ke AE nun okupas la unuan lokon en sia klaso." Kun sama fiereco ni rajtas diri, ke tio estas denove vera. Nia eminenta kaj leginda kolego, "Brita Esperantisto", bonvolis skribi en la numero de Septembro-Oktobro 1947, ke "AE staras en la unua vico de Esperanto-gazetoj" kaj ke "ĝi estas unu el la plej bonaj naciaj Esperanto-gazetoj kaj meritas larĝan disvastigon." Similaj komplimentoj atingis nin el multaj landoj. Tamen komplimentoj ne sufiĉas por disvastigi, plibonigi kaj pli-grandigi nian gazeton kaj — kun ĝi — la Esperanto-movadon. Ni bezonas pli multe da membroj por EANA, pli multe da abonantoj por AE, pli multe da kunlaboro kaj komprenemo por la agado de la Centra Oficejo, kiu kelkfoje faras erarojn — kiel niaj antaŭuloj faris, sed kiu baraktis kaj baraktadas kun mil malfacilaĵoj kaj kiu "laboras 14 horojn ĉiutage", kiel S-ro Baker faris antaŭ 40 jaroj.

[FINO]

FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ PRI ESPERANTO

LIBRO DE D-RO IVO LAPENNA

D-ro William Solzbacher

(Daŭrigo de recenzo komencita en la numero Majo-Junio.)

D-ro Lapenna rakontas strangajn teoriojn pri la *sanskrita* kaj la *latina* lingvoj. El la fakto, ke en kelkaj klasikaj dramoj de malnova Hindujo, ekzemple *Sakuntala* de *Kalidasa*, bramanoj kaj princoj parolas *sanskrite*, ordinaraĵoj *prakrite*, li konkludas, ke "devis formiĝi tute aparta komuna lingvo por la superaj kastoĵoj de Bramanoj kaj nobelaro", kiuj vivis en "preskaŭ komplete kasta izoliteco", dum "la popola amaso parolis diversajn prakritajn dialektojn". La historiaj faktoj estas tute aliaj. La *veda* lingvo (en kiu la plej malnovaj klasikaj verkoj de Hindujo estas verkitaj) kaj parencaj dialektoj estis la lingvo de la tuta popolo. Poste la prakritaj lingvoj (el kiuj oni nun konas proksimume 40) fariĝis la komunaj lingvoj de la "superaj kastoĵoj" kaj de la "popola amaso". Sed sur la bazo de malnova dialekto parenca al la *veda* lingvo, la bramanoj, inter ili la fama gramatikisto Panini, starigis la klasikan *sanskritan* lingvon (la vorto signifas "perfekta") por uzo en religio, poezio, scienco kaj alta politiko. Tiam uzon ĝi gajnis eĉ en tiuj partoj de Hindujo, kie la *veda* lingvo kaj parencaj hindoeŭropaj lingvoj neniam estis uzitaj. La *sanskrita* lingvo, kiel artefarita lingvo de religio, scienco kaj diplomataj rilatoj, eĉ penetris en landojn ekster Hindujo, ekzemple en la regionojn, kiuj nun nomiĝas Indonezio, Birmo, Tajlando, Ĉeĵlono. Anstataŭ uzi la *sanskritan* lingvon kiel ekzemplon de "ĉefaj diferencigaj faktoroj", Lapenna estus devinta menciigi ĝin en la ĉapitro pri "unuecigaj faktoroj".

"Similan fenomenon oni rimarkas en la feŭda mezepoka Eŭropo", skribas D-ro Lapenna. "La latina estis en tiu epoko la lingvo de la regantaj superaj rondoj, dum la servutulaj popolamasoj parolis la plej diversajn lingvojn kaj dialektojn." Tio ne estas vera. La nobeloj parolis la samajn lingvojn kaj dialektojn kiel la popolamasoj. Nur tre malmultaj nobeloj lernis la latinan lingvon. Aliflanke la pastroj, kiuj grandparte venis el la familioj de metiistoj kaj kamparanoj, sciis kaj uzis la latinan lingvon, ne anstataŭ la popola lingvo, sed aldone al ĝi. Iom post iom multaj latinaj vortoj kaj esprimumoj penetris en la naciajn lingvojn, kreante la grandan nombron de "internaciaj vortoj", kiuj estas unu el la kondiĉoj por la ekzisto de Esperanto. Do ankaŭ la latina lingvo, kiun D-ro Lapenna mencias kun la titolo "kasta aŭ klasa faktoro" sub la "diferencigaj faktoroj", devus esti menciata sub la "unuecigaj faktoroj".

Kastoĵoj kaj Religioj

La Lapenna-ideo de "kasta lingvo", per kiu la altaj klasoj en Hindujo kaj Eŭropo estis tenitaj "en preskaŭ komplete kasta izoliteco" (p. 19), fariĝas eĉ pli absurda, se oni konsideras, ke virinoj preskaŭ neniam lernis la *sanskritan* kaj latinan lingvojn. La penso, ke hinda reĝo aŭ eŭropa grafo parolis al sia amatino aŭ edzino en lingvo, kiun ŝi ne komprenis, estas groteska.

Sub la titolo "religia faktoro" (p. 21) D-ro Lapenna diras: "Estas ĝenerale konate, ke preskaŭ ĉiuj religioj uzas apartajn lingvojn por siaj

ritoj. La katolika eklezio uzas la latinan lingvon. La ortodoksa aplikas la malnovan slavan. La ritoj de la greka eklezio estas farataj en la antikva greka lingvo. La mahometana religia komunajo uzas la araban literaturan lingvon." Tio estas nur parte vera, ĉar la aŭtoro uzas tre malprecizan esprimmanieron; li skribas, kvazaŭ la "ortodoksa" kaj la "greka" Eklezio estus du malsamaj organizoj. Li estus devinta diri, ke la Katolika Eklezio en sia latina rito uzas ĉefe la latinan lingvon (kaj iomete la malnovgrekan kaj malnovslavan lingvojn), ke la Katolika Eklezio en siaj aliaj ritoj uzas la grekan, malnovslavan, malnovarmenan, koptan, malnovetiopian, malnovsirian, kaldean, araban, hungaran, rumanan, georgan kaj anglan lingvojn. La Ortodoksa Eklezio uzas ĉefe la grekan kaj la malnovslavan lingvojn, sed ankaŭ la ukrainan, rumanan, albanan, georgan, anglan, kaj multajn aliajn. Kelkaj el tiuj liturgiaj lingvoj – sed ne ĉiuj – estas diferencaj de la popola lingvo. Cetere la religiaj lingvoj ankaŭ estas unuecigaj, ne diferencigaj faktoroj. La araba lingvo ekzemple estas uzebla kiel helplingvo en ĉiuj islamaj landoj, de Maroko ĝis Okcidenta Ĉinujo kaj de Turkujo ĝis Indonezio.

Kion diris Meillet?

Por la ĉapitro pri "Faktoroj influantaj la lingvoevoluo" (pp. 18-25), kun la subĉapitroj "Diferencigaj faktoroj" kaj "Unuecigaj faktoroj", Lapenna uzis artikolon de A. Meillet, *Différenciation et unification dans les langues* ("Diferencigo kaj unuecigo en la lingvoj"), publikigita en 1911 en la revuo *Scientia* kaj represita senŝanĝe en *Linguistique Historique et Linguistique Générale*. La ĉefa teorio de tiu artikolo estis, ke la unueco de civilizo kondukas al unueco de lingvo malgraŭ multaj diferencigaj influoj. Fine de la artikolo Meillet esprimas tion jene: "Ĉiu diferencigo estas sekvata pli aŭ malpli frue, kaj kelkfoje senprokraste, de reago, kiu havas tendencon al restarigo aŭ starigo de lingva unueco tie, kie ekzistas unueco de civilizo."

D-ro Lapenna miskomprenis partojn de la Meillet-artikolo, ŝanĝis ĝiajn argumentojn en tute nescienca maniero kaj eĉ false citis la francan lingviston. Lapenna skribas (p. 19): "Centoj da *Sudamerikaj* lingvoj – diras la fama Meillet en sia verko *Linguistique Historique et Linguistique Générale* – ne proksimiĝis unu al la alia, ĉar la plej granda parto de la kontinento estas maldense loĝata." Fakte Meillet (sur paĝo 116 de sia verko) tute ne parolas pri *sudamerikaj* lingvoj, sed simple pri *Ameriko*, kaj ĉiuj fakuloj scias, ke li pensis ĉefe pri *Nordameriko*. En la verko *Les Langues du Monde*, de A. Meillet kaj Marcel Cohen, tio estas klarigata sur p. 966: "Norde de la nuna meksika landlimo iam ekzistis neniu lingvo parolata de pli ol 50 000 personoj. Inter la 204 lingvoj de tiu grandega regiono, 70 procentoj estis parolataj de malpli ol 5 000 personoj. Oni eĉ trovis 34 lingvojn parolatajn de malpli ol mil personoj, kompare al proksimume 20 lingvoj parolataj de pli ol 20 000 personoj."

Sed la sama verko de Meillet kaj Cohen mencias (pp. 948-949), ke ekzistis inter la nordamerikaj indianoj "internaciaj lingvoj pli aŭ malpli artefaritaj", pri kiuj la libro skribas: "La Mobile-ĵargono, kies baza vortaro venis el la Choctaw-lingvo, servis por komercaj rilatoj de Florida ĝis la enfluejo de la Ohio-rivero en la Mississipi-riveron. Simile la Chinook-ĵargono, kies bazan vortaron liveris la lingvoj Chinook kaj Nootka, estis disvastigita ĉe la Pacifika Marbordo de Suda Alasko ĝis la norda limo de

Kalifornio. Fine, en la Grandaj Ebenajoj de Nordameriko, kie vagadis nomadaj gentoj apartenantaj al diversaj lingvaj grupoj, formiĝis gesta lingvo, kiu estis vera internacia kodo permesanta detalan interparoladon.”

Ĉu Kanado estas en Sudameriko?

Kelkaj eraroj de Lapenna estas tiel nekredeble krudaj, ke oni miras, kiajn fontojn li uzis por sia “esploro kaj dokumentado”. Mi neniam vidis nacilingvan verkon tiel fuŝan, ke ĝi dirus (kiel Lapenna sur p. 19): “Viglan priskribon de la multnombraj lingvoj en Suda Ameriko en la 17-a jarcento donis G. Sagard en sia libro *Granda Vojaĝo en la lando de Huranoj*. Li asertis, ke en la regionoj vizititaj de li, tre malofte du vilaĝoj parolis la saman lingvon.” La nomo de Gabriel Sagard (el la Franciskana Ordeno) estas bone konata al historiistoj kaj lingvistoj. Li neniam estis en Suda Ameriko, sed vizitis la *buronojn* (ne *buranojn*), kiuj tiam estis la plej multnombra indiana gento en Kanado kaj en la regiono, kiun nun okupas la ŝtatoj New York kaj Michigan. Lago Huron estas nomita laŭ ili. Sagard estas aŭtoro de Vortaro de la Hurona Lingvo. La titolo de lia libro, kiu aperis en Paris en 1632, estis “La Granda Vojaĝo en la Lando de la Huronoj, ĉe la Freŝakva Maro kaj ĉe la Ekstremaj Limoj de Nova Francujo, ankaŭ nomata Kanado”. Se amatoro kiel Lapenna skribas pri afero, kiun li evidente neniam studis, li devus almenaŭ kontroli la bazajn faktojn en iu enciklopedio.

Mi ankaŭ miris iomete pri la “grandaj montoĉenoj de la duoninsulo Irawadi”, pri kiuj D-ro Lapenna parolas sur paĝo 19. La Irrawaddy estas rivero, ne duoninsulo. Ekzistas ankaŭ provinco Irrawaddy, en la delto de la samnoma rivero; sed ne estas montoĉenoj en ĝi. La montoĉenoj de Birmo paralelas la supran kaj mezan fluon de la rivero. Estas vere, ke en Birmo ekzistas multaj lingvoj, pli ol 15. Sed neniu el ili estas vere izolita lingvo. Ĉiuj apartenas al unu el la tri gravaj sudorientaziaj lingvofamilioj, kies ĉefaj reprezentantoj estas la birma, la siama kaj la kamboĝa. La ekzemplo de Birmo cetere ne estas la plej bona trovebla por illustri la “grandan diferencigan rolon de la geografia faktoro”.

La Lapenna-libro enhavas asertojn, kiujn neniu moderna lingvisto akceptus, ekzemple, ke “eĉ en Anglujo...la kamparano kelkloke ne konis pli ol 300-400 vortojn ankoraŭ en la pasinta jarcento” (p. 20) kaj ke “eĉ hodiaŭ oni ne multe eraros, se oni taksos tiun komunan vortprovizon je ĉirkaŭ 500 vortoj” (21). Fakte oni delonge scias, ke eĉ la plej primitivaj homoj uzas multajn milojn da vortoj. Lapenna falas en la kontraŭan eraron, kiam li diras (31), ke “en la franca lingvo ekzistas pli ol 2300 finaĵoj nur por la verboj”. Tio estas lingvistika absurdaĵo kaj estas aritmetike nebla.

Ŝajnas al mi, ke malgraŭ kelkaj bonaj elementoj la ĉapitro pri “Faktoroj influantaj la lingvoevoluan” ne havas multe da valoro kaj estas neuzebla propagandcele. Cetere, eĉ se Lapenna estus sekvinta la argumentojn de Meillet pli zorge, artikolo verkita en 1911 – do antaŭ la plena evoluo de la moderna lingvistiko – ne estus kontentiga bazo por teoria fundamentigo de lingvoproblemoj en nia tempo.

El la Historio de Esperanto

Mi skribis, ke D-ro Lapenna evidente ne scias multe pri la historio de Esperanto. Eraroj kaj malklaraĵoj abundas en liaj klarigoj, kaj legantoj ne ricevas ĝustan bildon pri la evoluo de la Esperanto-movado. Li skribas

ekzemple (pp. 131-132): "...Francujo, kie jam en la jaro 1898 estis fondita tutlanda asocio kun la nomo Franca Societo por la Propagando de Esperanto. Kiel diras la nomo, temis pri organismo kuniganta la lokajn grupojn kun pli malpli sama celo: disvastigi la lingvon per informoj kaj artikoloj, organizi kursojn, kunigi la simpatiantojn kaj militantojn... En la fino de la jaro 1910 ekzistis entute 12 tutlandaj societoj." Tiu citaĵo enhavas pli da eraroj ol frazoj.

En la fino de la jaro 1910 ekzistis ne 12, sed pli ol 35 tutlandaj societoj Esperantistaj. Landaj asocioj fondiĝis ĝis tiu tempo en la jenaj 36 landoj:

Tabelo de Landaj Asocioj ĝis 1910

Aŭstrujo	1908	Hindujo	1907	Nederlando	1905
Belgujo	1905	Hispanujo	1903	Novzelando	1910
Bohemujo	1908	Hungarujo	1905	Polujo	1908
Bolivio	1905	Irlando	1907	Rumanujo	1907
Brazilo	1907	Italujo	1910	Rusujo	1908
Britujo	1904	Japanujo	1906	Samoso	1906
Bulgarujo	1906	Kanado	1907	Serbujo	1909
Ĉilo	1907	Katalunujo	1910	Slovenujo	1908
Danujo	1908	Kroatujo	1908	Svedujo	1906
Filipinoj	1907	Kubo	1910	Svisujo	1903
Finlando	1907	Meksiko	1907	Turkujo	1910
Francujo	1898 (1903)	Monako	1903	Usono	1905

Estas vere, ke fine de 1910 la kanada asocio kaj eble ankaŭ la bolivia kaj filipina asocioj ne plu estis aktivaj, sed aliflanke ekzistis pli ol unu neŭtrala landa asocio en diversaj landoj: Germanujo, Bohemujo, Hungarujo, Rumanujo. Landaj asocioj de katolikaj Esperantistoj jam ekzistis en Nederlando, Belgujo, Francujo, Bavarujo kaj eble unu aŭ du aliaj landoj. Jam ekzistis ankaŭ Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Sekcio de la Franca Socialista Partio.

La asocio fondita en Francujo en 1898 ne estis Franca Societo por la Propagando de Esperanto, sed simple Societo por la Propagando de Esperanto, internacia laŭ karaktero kaj agadkampo, kun membroj en multaj landoj. Nur en 1903 la Societo renomiĝis Franca Societo por la Propagando de Esperanto.

Ne estas vere, ke, "kiel diras la nomo (kia logiko!), temis pri organismo kuniganta la lokajn grupojn." La Societo havis nur individuajn membrojn, ne lokajn grupojn. En la tuta Francujo tiam ekzistis nur unu klubeto: en Louhans (Saône-et-Loire). La Pariza Grupo fondiĝis nur du jarojn post la Societo.

"En la jaro 1905...la unua Universala Kongreso de Esperanto...formis la tiel nomatan Lingvan Komitaton kun la Akademio de Esperanto" (p. 132). La Akademio de Esperanto ekzistas nur de 1949. La Kongreso en 1905 elektis provizoran "Komitaton pure lingvan", kiu en 1906 fariĝis la Lingva Komitato. Superan komisionon sub la titolo *Esperantista Akademio* (ne *Akademio de Esperanto*) ĝi starigis en 1908. En 1949 la membroj kaj funkcioj de la Lingva Komitato kaj Esperantista Akademio kuniĝis en unu organo: la Akademio de Esperanto.

La Esperanto-Gazetaro

Ankaŭ pri la historio de la Esperanto-gazetaro la libro de D-ro Lapenna enhavas erarojn. Oni eĉ povas vidi, kiel la aŭtoro miskopiis el la *Enciklopedio de Esperanto*. Parolinte pri *La Esperantisto* kaj la fondo de *Lingvo Internacia* en 1895, D-ro Lapenna daŭrigas: "Ĉirkaŭ tiu tempo komencis aperadi ankaŭ *L'Espérantiste* kaj *Sciigo de la Estraro de la Klubo Esperantista en Stockholm*" (p. 95). Tio ne estas ĝusta. Ili komencis aperi ne "ĉirkaŭ tiu tempo", sed tri jarojn poste. La *Enciklopedio* diras (p. 168): "Ĉirkaŭ ĉi tiu tempo (jan. 1896 – dec. 1897) aperis en Hannover *Linguist...*, *Je la fino de la 19-a jarcento* aperis ankoraŭ *L'Espérantiste* kaj *Sciigo de l' estraro de la klubo Esperantista de Stockholm*." Ĉu kopiado vere estas tiel malfacila?

Oni malbone komprenas, kial aŭtografita kluba bulteneto kiel *Sciigo de l' Estraro de la Klub Esperantista en Stockholm* (tio estis la ekzakta titolo laŭ la *Katalogo de la Esperanto-Gazetaro* de Takács) estas menciata en la Lapenna-libro, kiu aliflanke ignoras la duan el ĉiuj Esperanto-gazetoj en la mondo. Ĝi estis *La Mondlingvisto*, eldonita de M. S. Bogdanov en Sofia en 1889-1890. La unua numero havis 54 paĝojn.

Lapenna diras (95-96): "Laŭ la granda verko *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan, ĝis la jaro 1929 entute aperis 689 diversaj gazetoj kaj revuoj. Tiu ĉi nombro enhavas la grandajn kaj gravajn revuojn, sed ankaŭ la malgrandajn, efemerajn gazetojn. Ĝi tamen ne entenas la unuope aperintajn, neregulajn multobligitajn bultenojn, foliojn k. s."

Tiu nombro 689 estas alia pruvo por la fakto, ke la aŭtoro de *La Internacia Lingvo* dormis dum la lecionoj de elementa aritmetiko, kiam li estis 7- aŭ 8-jara knabo. Sur paĝo 305 de la *Bibliografio* Stojan parolas pri "246 gazetoj regule aperintaj en 43 landoj", sur paĝoj 306-350 li priskribas 715 gazetojn kun bibliografiaj numeroj; sur paĝoj 351-354 li mencias la nomojn kaj eldonlokojn de 270 aliaj gazetoj, al kiuj li ne donis bibliografiajn numerojn (*Nomaro de unuopaj, neregulaj, manskribitaj kaj dubaj aŭ nekonataj gazetoj, folioj, kajeroj*). Li do mencias entute 985 Esperanto-gazetojn kaj bultenojn. El la *numeritaj* Esperanto-gazetoj la unua (*La Esperantisto*) havas la numeron 3 190, la lasta la numeron 3 879. Tio faras 690 *plenajn* numerojn, ne 689, ĉar la listo ja inkluzivas la unuan kaj la lastan numeron. Sed fakte la nombro estas 715 pro la 25 *a*- kaj *b*-numeroj. Regulaj uzantoj de la Stojan-Bibliografio bone scias, ke, kiam Stojan aldonis libron aŭ gazeton al listo, en kiu la bibliografiaj numeroj jam estis indikitaj, li uzis ekstrajn numerojn kun *-a*, *-b*, *-c*, kaj tiel plu. Ekzemple *Amerika Esperantisto* havas numeron 3 324, *Filipina Esperantisto* numeron 3 324-a. Kompreneble ili estas du tute malsamaj gazetoj kaj ne povas esti kalkulataj kiel nur unu.

Cetere oni miras, kial Lapenna ne uzis multe pli kompletan kaj novan statistikon, kiu aperas en la *Katalogo de la Esperanto-Gazetaro* de D-ro Jozefo Takács, eldonita en 1934. Kun la helpo de fakaj kunlaborantoj, inter kiuj troviĝis la genia Paul Tarnow, D-ro Takács zorge tralaboris la Stojan-liston, korektis erarojn en ĝi, aldonis novajn eldonaĵojn, uzis sian propran vastan kolekton kaj la kolektojn de Tarnow kaj Spierer. La *Katalogo* estas produkto de serioza esploro kaj dokumentado. Ĝi konkludis (en 1934), ke ĝis tiam entute aperis 1 276 diversaj Esperanto-gazetoj en 459 urboj de 59 landoj. Nur unu kajero aperis de 45 el tiuj gazetoj,

2-8 kajeroj aperis de 448, 1 jarkolekto de 167, 2-5 jarkolektoj de 330, pli ol 5 jarkolektoj de 152, nenomata nombro da jarkolektoj de 134.

Kelkaj el la eraroj en la libro de Lapenna estas pri bagateloj tute ne menciindaj. Ne estas grave, ekzemple, kiom da membroj havis la Centra Komitato (poste nomata Internacia Centra Komitato) de la Esperanto-Movado, kiu funkciis de 1922 ĝis 1932. Sed se D-ro Lapenna pro iu kaŭzo decidis mencii la nombron, li estus devinta doni la ekzaktan nombron laŭ la Kontrakto de Helsinki. La ICK havis 6 membrojn. Li maŭguste diris 7.

La UEA-IEL-Skismo

Parolante pri la UEA-IEL-skismo, kiu daŭris de 1936 ĝis 1947, kelkaj tre ĝeneralaj klarigoj estus sufiĉaj en tia libro. Kial remaĉi malnovajn disputojn? Sed ĉi tie denove oni devas diri, ke, se pro iu ajn kaŭzo la aŭtoro decidis priparoli la aferon, li estus devinta fari tion korekte kaj objekte. Li skribas (sur p. 137): "...la Komitato decidis transporti la sidejon de UEA al Londono. Tiu decido estis aprobita de 80% de la delegitoj en la ĝenerala voĉdonado. Parto de la Svisaj membroj de UEA ne estis kontenta pri tiu solvo, sed nepre deziris konservi la sidejon de UEA en Ĝenevo. La klopodoj pri interkonsento ne sukcesis kaj tial la Komitato decidis dum la Universala Kongreso en Vieno fondi novan asocion kun la sidejo en Londono." Kia stranga historio! "Parto de la Svisaj membroj" malebligis efektivigon de la decido de "80% de la delegitoj"! Kompreneble la afero estis tute alia. La "ĝenerala voĉdonado" estis fuŝa kaj nevalida, kaj multaj delegitoj sciis tion kaj ne partoprenis. La Kantona Tribunalo de Genève solene konstatis la nevalidecon de la voĉdono la 3-an de Novembro 1936. En la voĉdono partoprenis proksimume 57 procentoj el la delegitoj, kaj 80% el ili voĉdonis "jes"; do entute malpli ol 46% el la delegitoj voĉdonis por fuŝa decido de la Komitato en leĝe nevalida voĉdonado. Ni nun ne elterigu la kadavrojn de la pasinteco, sed kial D-ro Lapenna donis falsan bildon pri bedaŭrinda afero, kies mencio li povis tute simple eviti? El historia perspektivo iu objektiva observanto konstatos, ke ambaŭ partoj en la konflikto faris erarojn kaj ke estas bone, ke ili fine decidis forgesi la pasintecon.

La UNO-Petskribo

La Internacia Lingvo enhavas alian sufiĉe gravan eraron, pri kiu tamen D-ro Lapenna estas senkulpa. Mi longe hezitis, ĉu mi menciu ĝin, sed ĉar ĝi rilatas al ciferoj, kiuj de tempo al tempo reaperas kaj iam povus kaŭzi veran embarason, estas eble utile, klarigi la aferon. Ĝi koncernas la laŭprofesiajn statistikajn ciferojn pri la Esperanto-Petskribo al la Unuigitaj Nacioj, precipe la mencio de "1607 lingvistoj, 5262 universitataj profesoroj kaj aliaj sciencistoj," k.t.p. (p. 162).

Tiuj, kiuj preparis la statistikon, ne sufiĉe diferencigis inter la individuaj kaj kolektivaj subskriboj. Se ekzemple en iu lando instruista asocio kun tri mil membroj kaj 235 individuaj ĝeinstruistoj subskribis la Petskribon, la statistiko simple kalkulis 3235. Tio estis speciale danĝera, kiam la kalkulanto miskomprenis la karakteron de iu organizo. Kompreneble eraroj ankaŭ okazis pri individuaj subskriboj, sed ĝenerale ili ne estis gravaj. Kiam mi ricevis la materialon, mi vidis ekzemple, ke kelkaj altaj administraj oficistoj estis enkalkulitaj inter la "parlamentanoj"; aliflanke kelkaj veraj parlamentanoj ne estis kalkulitaj kiel

parlamentanoj, ĉar la prilaborantoj ne komprenis iliajn titolojn. Estas versajne, ke la du specoj de eraroj proksimume egalas unu la alian. La nombro de "405 parlamentanoj", publikigita de UEA, do estas proksimume ĝusta, kvankam ne absolute ĝusta.

Sed kiam "kolektivaj" subskriboj eniras la bildon, la rezultoj de eraro povas esti multe pli gravaj. Ekzemple la plej granda parto el la "1 607 lingvistoj" konsistas el la kolektiva subskribo de la *Riksmålförening* de Oslo, kun 1 200 membroj. La prilaboranto komprenis, ke la celo de tiu asocio havas ian rilaton al lingvaj problemoj. Fakte membreco en tiu societo simple signifas, ke oni preferas unu formon de la norvega lingvo (*Riksmål*) al alia (*Nynorsk* aŭ *Landsmål*), sed certe la membroj ne estas lingvistoj. Ŝajnas, ke ankaŭ la kolektivaj subskriboj de kelkaj Esperanto-kluboj eniris la statistikon pri "lingvistoj". La cifero de "1 607 lingvistoj" do estas tute senvalora. Cetere ĝi ankaŭ estas fantazia pro alia kaŭzo: En la tuta mondo ekzistas nur kelkaj miloj da sciencaj lingvistoj.

La statistikaj ciferoj jam estis publikigitaj, kiam mi ricevis la materialon en 1950. Mi tuj decidis ne uzi la ciferojn de la profesia statistiko kaj ĉiam klare diferencigi inter la individuaj kaj kolektivaj subskriboj. Mi ne enmetis la profesion statistikon en la dokumentojn, kiujn mi prezentis al la Unuigitaj Nacioj la 2-an de Aŭgusto 1950. Mi ne menciis ilin en mia parolado farita je tiu okazo nek en la komunikoj al la gazetaro. Mi esperis, ke oni forgesos kaj ne plu uzos ilin.

Gramatiko kaj Vortfarado

La klarigoj, kiujn D-ro Lapenna donas pri la gramatiko kaj vortfarado de Esperanto ne estas tute kontentigaj. Ne estas vere, ke "la adverboj finiĝas per -e" (30); nur la *derivitaj* adverboj estas -e-vortoj. La aŭtoro donas mallertan klarigon pri la facila lernebleco de Esperanto por homoj el nehindoeŭropaj lingvofamilioj. Li skribas (31): "En Azio la ekstereŭropa karaktero de la gramatiko de Esperanto tre faciligas la lernadon. La morfologia strukturo de Esperanto estas tre parenca al la lingvoj de Malproksima Oriento, ekzemple al la Ĉina, kaj tute speciale al la lingvoj aglutinaj, ekzemple Turkaj-tataraj. Tiu karaktero de Esperanto cetere pruvas ke ĝi, estante laŭ la konsisto de la vortaro pli romandevena, samtempe laŭ sia strukturo pli similas diversajn lingvojn ekstereŭropajn."

Tio ne estas ĝusta. Preskaŭ ĉiuj detaloj de la Esperanto-gramatiko estas tute hindoeŭropaj laŭ origino kaj aspekto. La sola regulo, en kiu Esperanto similas la hungaran kaj turkan pli ol la hindoeŭropajn lingvojn, estas la fakto, ke la akuzativo havas la saman finaĵon en la singularo kaj la pluralo. Cetere la hungara kaj turka estas "eŭropaj" lingvoj, kvankam ili ne apartenas al la hindoeŭropa lingvofamilio. Kaj la hindoeŭropaj lingvoj estas parolataj en ĉiuj kontinentoj, ĉu ne? Oni ne povas paroli pri "eŭropa" aŭ "ekstereŭropa" karaktero de gramatiko.

La lingvistoj jam delonge ĉesis paroli pri "aglutinaj" lingvoj, ĉar la termino *aglutina* estas malfacile difinebla kaj ĉar, kia ajn estu la difino, neniu lingvo estas tute aglutina, kaj preskaŭ ĉiu lingvo havas kelkajn aglutinajn elementojn.

Estas fakto, ke Esperanto estas facile lernebla eĉ por personoj, ki-

es gepatra lingvo ne estas hindoeŭropa. Pri tio ĉiu konsentos kun D-ro Lapenna; sed li diras ĝin en netrafa maniero.

Eraroj Ĉiuspecaj

Bedaŭrinda fakto estas, ke trafoliumante la libron de D-ro Lapenna, oni trovas erarojn preskaŭ ĉie. Multaj el ili havas nenian rilaton al la temo de la verko, estus tute facile eviteblaj, sed kaŭzas dubojn pri la seriozeco kaj fidindeco de *La Internacia Lingvo*. Kial Lapenna mencias "la Svedan aviadilano societon SAS" (101), kvankam ĉiu, kiu havas elementan konon de aerlinioj, scias, ke ĝi estas komuna dana-sveda-norvega entrepreno? Kial li nomas Profesoron Charles Richet (39) "membro de la Franca *Académie de Médecine*", dum li nomas Louis Lumière kaj A. Cotton "membro de la Franca *Académie des Sciences*"? Ĉiuj tri ja apartenis al la sama Akademio. Estas vere, ke la Franca Akademio de Sciencoj havas Medicinan Sekcion, kiel ĝi havas Kemian, Fizikan, Astronomian kaj aliajn Sekciojn, sed la Akademio mem estas la sama. Kial Lapenna nomas Profesoron *John Eyton Bickersteth Mayor* (40) *B. Mayor*? Kial li diras, ke la loĝloko de la bedaŭrinde mortinta Akademiano Joŝicugu Okamoto estis *Mie-ken*? La urbo, en kiu li loĝis, estas *Ueno*. En japanaj adresoj *ken* estas distrikto, same kiel *cho* aŭ *machi* estas strato, *ku* urbkvartalo, *shi* urbo, *gun* subdistrikto, *fu* grandurba distrikto.

D-ro Lapenna ĝenerale verkas en klara kaj plaĉa stilo. Lia uzo de nia lingvo ofte estas elokventa kaj konvinka. Sed ĝi ne estas modela.

La plej obstina kaj konfuza stila eraro de Lapenna estas lia preskaŭ konstanta uzo de *estis -ita* anstataŭ *estis -ata* kaj *estas -ita*. Sur paĝo 113 li skribas: "Kiam Hitler okupis Aŭstrujon, la Muzeo...estis tuj fermita. Ĝia direktoro H. Steiner estis enkarcerigita." Tio povas signifigi nur, ke la Muzeo jam estis fermita kaj ke S-ro Steiner jam estis en malliberejo antaŭ la alveno de Hitler.

La malbelaj, nenecesaj kaj nelogikaj formoj *tiele* kaj *nure* meritas kritikon. La uzo de pluralo post *oni* ne estas rekomendinda: "*oni* ne estis *sukcesintaj* krei firman institucion,..." (146). Strangaĵoj en la uzo kaj neuzo de la artikolo estas oftaj.

La *interpunkcio* en la libro estas tute kaosa. La neologismo *superba* (67, 72) en la senco de *belega* estas nerekomendinda (cetere ĝi eĉ ne troviĝas en la *Suplemento* al la *Plena Vortaro*), ĉar multaj legantoj povos miskompreni la vorton en la senco de *tro fiera*. Lapenna ankaŭ estas infektita de la "*fare de*"-manio (51, 175 k. a.). Li nekorekte uzas la vorton *kioma* (95).

Preseraroj en "ordinaraj" vortoj estas maloftaj: *enregistrata* anstataŭ *registrata* (155), *racia* anstataŭ *nacia* (39), kaj tiel plu.

La uzo de majuskloj por *Franca*, *Angla*, *Rusa* estas nekutima kaj nerekomendinda.

Kunlaborantoj

Sur paĝo 12 de *La Internacia Lingvo* D-ro Lapenna dankas diversajn kunlaborantojn, kiuj verkis parton de la libro aŭ kies studoj servis kiel bazo por lia propra esploro kaj dokumentado. Kelkaj el tiuj helpantoj sendube devus partopreni en la laŭdo kaj mallaŭdo, kiujn la verko meritas. Recenzanto tamen ne povas scii, en kiuj kazoj la aŭtoro blinde kaj senkritike metis en sian libron erarojn pri faktoj kaj netrafajn argumentojn liveritajn de kunlaborantoj kaj en kiuj kazoj li mem fuŝis bon-

an materialon preparitan de aliaj. Ĉar Lapenna redaktis la libron kaj lia nomo estas la sola aperanta sur la kovrilo, mi ne laŭdis aŭ mallaŭdis iun el la kunlaborantoj. Se la aŭtoro volas transdoni al kelkaj el ili parton de la komplimentoj kaj kritikaj rimarkoj el mia recenzo, tio kompreneble estas lia rajto.

Epilogo

Kiam mi atingis ĉi tiun punkton en mia recenzo kaj vidis, ke ankoraŭ multaj notoj restas sur la tablo, mi sentis min tre laca. Eksidante en komforta brakseĝo, mi volis ripozi iomete – kaj ekdormis. Mi havis groteskan sonĝon: Mi vojaĝis en la lando de la Huranoj, en Suda Ameriko, ĝis la montoĉenoj de la duoninsulo Irawadi. Tie mi vidis strangan scenon: Ĉirkaŭ fajro, en kiu brulis pli ol du mil Esperanto-lernolibroj en 84 lingvoj, sidis la Estraranoj de UEA. En preskaŭ kompleta kasta izoliteco ili parolis sanskrite. Unu el ili tenis porklede binditan volumon, sur kiu oni legis en ruĝaj literoj la nomon LAPENNA. "Ni ne plu bezonas aliajn librojn," li diris. "La verko de la prestiĝa Estro transportas nin en mondon apartigitan, en mondon sanktecan." "Jes," diris alia Estrarano, "ĉi tiun libron oni devos prezenti al la estroj de UNESCO. Ĝi montros al ili, ke la malnovaj reguloj de la aritmetiko kaj logiko kaj la malnovaj faktoj de historio kaj geografio ne plu estas gravaj. Ilin anstataŭas la suverena saĝeco de LIA esploro kaj dokumentado." "Certe, certe," diris alia, "oni devigos tiujn UNESCO-sinjorojn, ke ili atente tralegu ĉiun unuopan paĝon, eĉ ĉiun linion." Subite aŭdiĝis laŭta ridado, kaj voĉo, kiu sonis kiel LIA voĉo, mokvokis: "Hahaha, kiaj azenoj vi estas! Mi nur volis montri, kiom da malsaĝaĵoj oni povas meti en libron, kiun la recenzantoj de la Esperanto-gazetaro laŭdegos kun senrezerva rekomendo, senrezerva rekomendo, senrezer...."

Mi vekigis. Antaŭ mi kuŝis N-ro 1207 de "Heroldo de Esperanto". En ĝi mi legis: "...senrezerva rekomendo...ĝi posedas grandan valoron pro sia kompleteco...kaj fidindaj faktoj kaj ciferoj." Mi frotis miajn okulojn kaj legis denove: "...f-i-d-i-n-d-a-j f-a-k-t-o-j k-a-j c-i-f-e-r-o-j." Mia kapo doloris. Mi reekdormis.

(FINO)

INTRODUCTION TO ESPERANTO

The Universal Language
3rd Edition – Price \$2.00



Send on five days
examination **FREE.**

Box 792, Placerville, Calif.

GERMANA ESPERANTO-REVUO

Oficiala Organo de la
Germana Esperanto-Asocio

Monata Revuo, 12-paĝa
Esperanto- kaj Germanlingve

Jarabono: \$1.75 afrankite
Duonjaro: \$.90 afrankite
Anonceto: po 25 vortoj 40¢

Abonebla pere de
**ESPERANTO, 114 W. 16 STREET
NEW YORK 11, N. Y.**

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

<i>PRACTICAL ESPERANTO</i> , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
<i>REED'S PRACTICAL GRAMMAR</i> , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
<i>ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE</i> , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
<i>COURS PRATIQUE D'ESPERANTO</i> , preface by Th. Carl. Complete text in French with exercises, Partie Elémentaire & Supérieure, 2 vols, 239 pp...	1.45
<i>ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY</i> , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 2.00
<i>ESPERANTO (World Language Series)</i> , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
<i>WORLD'S CHIEF LANGUAGES</i> , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
<i>EDINBURGH DICTIONARY</i> . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
<i>MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY</i> . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
<i>FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY</i> . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
<i>PLENA VORTARO DE ESPERANTO</i> , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The new latest edition, all-Esperanto dictionary with <i>Suplemento</i> , 511 pp., 4x5½.....	Cloth 3.35
<i>SUPLEMENTO AL PLENA VORTARO</i> , separate edition, 6x8 in., 63pp.....	1.25
<i>FUNDAMENTA KRESTOMATIO</i> , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.85
Latest edition, with additional foot-notes, etc., de luxe printing,.....	Cloth 3.15
<i>KARLO</i> , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
<i>THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)</i> . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
<i>ESPERANTO SORTIMENTO</i> . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, & <i>Thais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
<i>RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS</i> . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Serba, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
<i>INDIAN BEAD STAR</i> . Genuine "Kiowá" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
<i>GREEN STAR PENDANT</i> . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
<i>ENAMEL GREEN STAR</i> . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only* \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only* \$6 *more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.